

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1965

Norvegio

lando de la 17a IFEF-kongreso

En majo 1964 decidis la komitato de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) sekvi la inviton de la norvega landa asocio por la 17a IFEF-kongreso de la 22a ĝis la 28a de majo 1965. Kongresurbo estos Hamar situanta 126 km norde de la metropolo Oslo.

Norvegio (naciingve Norge) estas la plej nordokcidenta lando en Eŭropo. Kun 323 916 km² ĝi etendiĝas kiel granda altmontarstepo 1750 km de la nordo ĝis la sudo kaj estas tratanĉita de valoj kaj fjordoj. Antaŭ 20 000 km de marbordoj situas ĉirkaŭ 150 000 insuloj kaj rifoj. Sub la influo de la varma golfofluo la klimato estas relative milda kaj multdiferenca en la pejzaĝbildo. Ĉarmaj fruktodonaĵ regionoj alternas kun sovaĝaj altmontarstepoj kaj neĝkovritaj montpintoj kun arbokovritaj deklivoj. 72% de la areo estas roka, marĉa, glacia aŭ nekulturita tereno, 25% konsistas el arbaro, kiu cetere servas kun 35% al la eksporto. Dank' al la abundaj akvofortoj la elektrika energio regas ĉie. Dum la fervoja trafiko suferas sub malfavoraj geografiaj cirkonstancoj — ne ekzistas trairanta komunikado inter sudo kaj nordo — la ŝipveturado grandskale evoluis. Laŭ la kapacito de la varŝipoj Norvegio apartenas al la plej potencaj landoj de la mondo. La loĝantaro, el kiu 34% laboras en la industrio, ne superis 4 milionojn. Ĉefurbo estas Oslo kun 471 000 enloĝantoj.

La loĝigo de Norvegio reiras en la praperiodon antaŭ nia erao. En la 7a jarcento fondiĝis la gento de la norvegaj reĝoj. Normanoj pligrandigis la landon je Grenlando kaj Islando. En la 9a jarcento la kristana religio enkondukiĝis. Bataloj kontraŭ la romkatolika eklezio ekde la 12a jarcento kon-

dukis al la posta luterana ŝtateklezio. De 1397 ĝis 1814 Norvegio apartenis al Danlando. De 1814 ĝis 1905 ĝi estis unuigita kun Svedio. Inter 1940 kaj 1945 Norvegio suferis sub la okupado de la germanaj trupoj. Nun ĝi estas memstara konstitucia reĝlando. La legislativa nomigaĵo „stortin“, la ekzekutiva „stadsrad“. Politike Norvegio apartenas al la okcidenta hemisfero.

Hamar, la kongresurbo, situas idilie ĉe la orienta bordo de la lago Mjøsa. Ĝia historio komenciĝis kun la konstruo de katedralo kaj kastelo. Hamar fariĝis centro por la kultura kaj spirita vivo de la orienta parto kaj por la sekulara potenco. Pesto en 1350 kaj milito en 1563 degeneris kaj detruis la gloran periodon. Nur en 1849 komenciĝis la novkonstruado, 2 km for de la ruinoj, kiuj nun formas muzerejon. Denove evoluis centro. La urbobildo estas karakterizita per komerco, lernejoj, industriaj entreprenoj, episkopa sidejo, fervojaj oficejoj de la distrikta administracio kaj — nelaste — la konata fervoja muzeo.

Tie IFEF kongresos en majo. Certe niaj asocioj eluzos tiun konvenan okazon por esti denove en la granda familio de esperantistaj fervojistoj des pli multe, ĉar dum la venontaj jaroj IFEF-kongreso ne tiel baldaŭ okazos en Skandinavio.

W. B.

17. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF)

Anmeldeformular

mit Verbandsorgan „La Internacia Fervojoisto“ bereits verteilt. Nachforderung nur über Korrespondenzanschrift.

Anmeldung

unmittelbar über Korrespondenzanschrift bis spätestens 20. 4.

Bankkonto

300/924, Vangs Sparebank, Hamar, Norvegio.

Dauer

22. — 28. 5. 1965

Geldüberweisung

unmittelbar an Bank, evtl. unter Benutzung eines Kontos der Eisenbahn-Sparkasse.

Klebemarken

Anforderung nur über: Odd Kolbrek, Kalbakkstubbene 22, Oslo, Norvegio.

Kongreßbeitrag

bis 1. 3. = 40 Nkr., bis 20. 4. = 50 Nkr. Für Familienangehörige, Jugendliche und Pensionäre die Hälfte.

Kongreßgebäude

Festiviten, Strandgt. 23, Hamar, 200 m vom Bahnhof entfernt.

Korrespondenzanschrift

17a IFEF-Kongreso, postkesto 61, Lötene, Norvegio.

Weitere Angaben

über Kosten für Unterbringung, Ausflüge, Vor- und Nachkongreß bitten wir dem Anmeldeformular sowie den Veröffentlichungen im Verbandsorgan „La Internacia Fervojoisto“ zu entnehmen.

En propra afero

Tiu eldono ne plu havas la longjare konatan vizaĝon. La titolo mem restis, sed modernigis la literon. Ni adiaŭis la emblemon de la vaportrajno kaj adeptis kiel simbolon por nia faka asocio la flugilradon kun verda stelo. La verda koloro ne povos aperi pro la kostoj, kiel entute la kostoj por nia organo pro konataj kaŭzoj devos esti respektataj pli precize ol dum la antaŭaj jaroj. Ni klopodos eldoni BULTENO en la ĝisnuna kvalito kaj amplekso. Sed niaj legantoj komprenu, ke BULTENO ne povas kaj ne volas anstataŭi aliajn Esperantogazetojn. Kiu deziras informi sin pri aranĝoj de la ĝenerala Esperantomovado, pri literaturo kaj distraĵo, ne serĉu tiajn legaĵojn en nia organo, kvankam de tempo al tempo ni tuŝas ankaŭ tiajn temojn. Eksterlandaj interesuloj ne atendu, ke iliaj alvokoj kaj anoncoj aperos kun kompleta teksto. Tion jam malpermesas la malgranda formato. Bonvenaj estas kiel antaŭe kontribuajoj flanke de niaj asocianoj, ĉefe raportoj pri grupaj kaj distrikataj kunvenoj.

Eble tiu okaze estas konvena por analizi kritike nian ĝisnunan agadon, speciale la varbadon. Ankoraŭ ekzistas tre multaj fervojistoj, kiuj certgrade simpatias nian laboron sen koni detalojn. Kiamaniere oni scias allogi posesperantan intereson, pruvis la aranĝoj en Frankfurt kaj Stuttgart komune kun aliaj sekcioj. (Vidu la rubrikon „El la grupo!“.)

Nia celo tiujare estu pligrandigi la reputacion de Esperanto inter la fervojistoj, kio devos konduki ankaŭ al pligrandigo de nia membronombro. Tre grava estas pozitiva sinteno de niaj gekolegoj, ĉefe de la superaj, rilate Esperanton. Ĉiu el ni estas respondeca. La redakcio

Nekrologo

La informo pri la subita morto de s-ano Michl Ehbauer, kiu mortis la 1an de decembro 1964, kortuŝis ĉiujn, kiuj konis lin. Li estis 65 jarojn kaj esperantisto de 1929. Naskite en Amberg (Norbavario) li venis al München en 1915 kaj fariĝis fervojisto ĉe la tiamaj Bavaraĵ Ŝtatervojjoj.

Lia talento verki kaj deklami popularajn poemojn en bavara dialekto estis tiel unika, ke ofte oni aŭdis lian voĉon en la radio kaj sur la scenejo. Krome li verkis humorajn librojn, el kiuj vaste konatiĝis la „Bavara mondhistorio“. Neniam li ofendis iun per sia humoro. Neforgeseblaj estas liaj kontribuajoj okaze de la GEFA-jarkunveno 1963 en Regensburg, kie li sciis trafe kombini dialektajn versojn kun tiaj en Esperanto.

Kiel esperantisto li partoprenis inter 1932 kaj 1964 multajn naciajn kaj internaciajn kongresojn, gvidis kursojn kaj aktive agadis okaze de kunvenoj aŭ manifestacioj. Laŭ lia deziro la entombigo okazis senpublike. La gazetoj en München dediĉis al la mortinto ampleksajn, decajn nekrologojn. En nia memoro li restos kiel fervora, sprita esperantisto.

Germana Esperanta Fervojista Asocio
Estraro

Bücherei

Der Verwalter der Zentralbücherei, Koll. Schiermann, befindet sich ab 1. Januar 1965 beim Bahnhof Elze (Han). Wir bitten die Benutzer der Zentralbücherei, sich nur an die obige Anschrift zu wenden.

GEFA-Vorstand

GEFA-jarraporto 1964

Ni daŭrigas ĉi tie la jarraporton, kiu en la lasta eldono ne povis aperi komplete.

La redakcio

La **GEFA-biblioteko** estas uzita sufiĉe kontentige. Planite estas konsiderinde pligrandigi la librostokon kaj envicigi ĉiaspacajn librojn pere de kunhelpado de ĉiuj distriktkomisiitoj. En **BULTENO** ni publikos denove la libroliston kaj la prunteprenmanieron.

En la sektoro „varbado“ ni entreprenis novan paŝon. Ni kompilis **flugfolion** kvarpaĝan, kiun ni preparis speciale por fervojistoj, kvankam ĝi povas esti utiligata ankaŭ por nefervojistoj. Eldonkvanto estas 10000. Se oni uzos ĝin celtrafe, ĝi povos efike helpi altiri novajn adeptojn. Specialan dankon ĉi tie al **BSW** (Socialorganizo), kiu grandparte transprenis la eldonkostojn. Artikulo kun simila enhavo sekvis en la novembra numero de la „Sozialblatt“.

La **ekzamenkomisiono** de GEFA sub gvidado de d-ro Lang okazigis de aŭtuno 1962 ĝis nun tri lingvajn ekzamenojn. 23 kandidatoj plenumis sukcese la kondiĉojn. El ili 19 akiris la unuan gradon (lingva kapableco), inter ili eĉ blindulo, kaj 4 la duan gradon (kursgvidanto).

Kun la **fervojistaj radioamatoroj** antaŭ nelonge ni interrilatis por esplori la problemon, ĉu kaj kiamaniere Esperanto povus esti utiligata por la radiofono. Nia ideo estas, ke la fervojistaj radioamatoroj en la tuta mondo kaj precipe en Eŭropo eklernu Esperanton kun la helpo de la landaj IFEF-asocioj. Tiam ili estus kapablaj

interrilati senpere sen lingvaj malfacilaĵoj. Ni daŭrigos niajn klopodojn tiurilatajn.

Intertempe komenciĝis alia „kampano“, nome la **surbendigo de memoroj**, kiujn niaj veteranoj konservas en siaj cerboj pri longe pasintaj tempoj. Tiel ni esperas, ke ni povos fiksi por la posteuloj gravajn sciindaĵojn, kiuj alikaze baldaŭ estus forgesataj.

Antaŭ ol fini la jarraporton oni ne povas ne menciigi, ke la evoluo rilate la junularon ne estas kontentiga. La slogano je la fino de la lastjara jarraporto „Ĉiu membro varbu en ĉi tiu jaro minimume unu junulon“ ne alportis fruktojn. La dise loĝantaj malmultaj gejunuloj ankoraŭ ne havas sufiĉe da fortoj kreskigi la aferon nur el si mem. Ili bezonas nian helpon. Allogaj, amuzigaj aranĝoj estas unu el la helprimedoj. Ni ne atendo idealistojn, sed ni altiru gajajn, viglajn junajn homojn, kies entuziasmon ni veku. Simila validas por GEFA entute. Ni ne povos esti kontentaj. Plej ofte la viclego de la lokaj grupoj dependas de unu, du kapablaj kaj bonvolaj membroj. La teruraj negativajoj de la nuntempo nur povas esti neŭtralizitaj, se troviĝas sufiĉe da homoj, kiuj kreas pozitivajn. Inter tiaj pozitivaj aferoj unu el la plej gravaj estas la rekta komprenebleco inter homoj de diversaj lingvoj. Ni povas esti fieraj pro nia kunagado per tia vere nobla celo. Tiu fakto ĉiam denove donu al ni freŝajn fortojn por kontraŭstari kaj forŝovi la sennombrajn obstaklojn.

Giessner

GEFA-prezidanto

Vorstand und Beauftragte

der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Stand : Januar 1965

Vorstand

Vorsitzender: BOI Gießner, Bf Elze (Han), Basa 949/852/31

Sekretärin: BOS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt, Basa 955/2759

Schriftleiter: BOI Barnickel, Tarifamt Frankfurt, Basa 955/5683

Sonderbeauftragte

Kassierer: BAmtn Denk, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1506

Sprachprüfungen: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1501

Fachwörtertum: BI Ritterspach, Tarifamt Frankfurt, Basa 955/2239

Bücherei/BULTENO-Versand: BOBw Schiermer, Bf Elze (Han), Basa 949/852/25

Bezirksbeauftragte

Augsburg: BI Schiebl, BA Kempten (Allg), Basa 964/844/430

Essen: BOAmtn Schnetzer, Bf Hamm (Westf), Basa 944/807/391

Frankfurt: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt, Basa 955/1501

Hamburg: BOI Lepke, BD Hamburg — B-Büro —, Basa 947/5444

Hannover: BS Heimlich, Bm Soltan (Han), Basa 949/850/127

Karlsruhe: BOI Hug, BD Karlsruhe — Ps-Büro —, Basa 953/5005

Kassel: BOI Keil, BD Kassel — Ps-Büro —, Basa 957/1270

Köln: BS Mester, Bf Rheydt-Geneicken, Basa 943/822/122

Mainz: Bass Rithaler, Bf Altbisheim, Basa 954/832/420/3

München: T BAng Baader, BZA München, Basa 962/2538

Münster: t BI Brandenburg, Bm Münster 3, Basa 945/397

Nürnberg: BOI Gößmann, BD Nürnberg — V-Büro —, Basa 966/5857

Regensburg: t BOI König, AW Weiden, Basa 965/829/622

Saarbrücken: BS Haupenthal, Ga Saarbrücken Hgbf, Basa 956/5523

Stuttgart: BI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —, Basa 952/5503

Wuppertal: BOI Graß, BD Wuppertal — To-Büro —, Basa 946/468

El la grupoj

Duisburg-Wedau. La esperantistaj fervojistoj kunvenos kun la membroj de la „Kreis der Esperanto-Freunde Duisburg“ ĉiun duan sabatojn je la 18a horo. Renkonteĵo: Konferenca ĉambro de la aten ejo en la ĉefstacidomo Duisburg. Gastoj estas bonvenaj!

Elze (Hann). La 19an de decembro nia grupo kunvenis por komune festi kun la novaj gekursanoj. Estis unue la ĉiujara rememorigo je la mortodato de d-ro Zamenhof, kaj estis due referato pri la kunlaborado inter UEA kaj UNESKO kaj pri la jaro de internacia kunlaborado, kiuj kunvenigis nin. Kompreneble ni „ornamis“ ĉi tiujn ĉefpunktojn per prozaĵoj kaj poemoj kaj kompletigis la programon — ĉefe pro la novuloj — per kolorbildoj kaj kataluna muziko pri la neforgebla kongreso de Barcelona.

Post tiu oficiala parto ni kurestadis ĉe festa tablo kun bonega kafe kaj multspecaj kukoj, kiujn ĉiuj ĉeestantoj estis kunportintaj (tre praktika). Tiamaniere akirintaj freŝajn fortojn, ni kantis kristnaskajn kantojn kaj popolokantojn ĉe diverslandajn, akompanatajn per gitaro. Glate niaj genovuloj iom pli ol nur du monatojn „aĝaj“ kunagis. Entute tre agrabla vespero. Gi

Frankfurt. Nova stimula vojo estis provata por vekti la poresperantan intereson inter la fervojistoj. La 7an de decembro 1964 okazis komuna aranĝo de la esperantistaj, kantistaj kaj filatelistaj fervojistoj en la kantina salonego de la direkco Frankfurt. D-ro Lang, la komisiito por Esperanto en la distrikto Frankfurt, salutis ankaŭ nome de la „Bundesbahn-Sozialwerk“ (Sociala Servo) 150 kunvenintojn akcentante la grandan valoron de la kultura agado. S-ano Mager, membro de la filatela sekcio kaj same de la Esperanto-grupo, montris kolorajn diapozitivojn pri ĉiuj Esperanto-poŝtmarkoj eldonitaj de ok landoj dum 40 jaroj. La prezentado vekis grandan intereson.

Nürnberg. La 30an de decembro 1964 salutis s-ro Gössmann, la komisiito por la distrikto Nürnberg, 200 gesamideanojn en la salonego de la fervoja muzeo Nürnberg. Per klasikaj muzikajoj kaj recitaĵoj oni celebris la Zamenhof-feston, kies kulmino estis la grandioza festparolado de prof. d-ro Lapenna, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio. La konata oratoro majstre prezentis la problemojn de la diskriminacio, ĉefe el vidpunkto de la Internacia Lingvo, kaj alvokis partopreni multnombre al la peticia kampanjo de UEA ĉe UNO en 1965. (GEFA posedas sonbendon pri la 40minuta alparolo.) La aŭskultintoj apartenis grandparte al la 8a seminario de la Germana Junularo, kiun dum tiu jarfina semajno partoprenis 120 gesamideanoj el 17 landoj kaj 3 kontinentoj.

Stuttgart. La iniciativoj de s-ano Kiefer, la komisiito por Esperanto, en la distrikto Stuttgart, kondukis al vaste publikigita ekspozicio en la direkcia domego. Ĝi okazis de la 12a ĝis la 15a de novembro 1964. Evidenta estis la intereso inter la fervojistoj kaj aliaj vizitintoj. La ekspozicio entenis ne nur la kutiman materialon el literaturo, gazetaro, turismo kaj filatelo. Oni povis ankaŭ vidi diskojn kun esperantigitaj kanzonoj kaj rigardi unikan kolekton de pupoj el multaj landoj kolektitaj pere de Esperanto. Kompreneble la agado de la esperantistaj fervojistoj en-kaj eksterlande estis alloga objekto de la intereso. Ne mirinde, ke tri lokaj gazetoj („Deutsches Volksblatt“, „Esslinger Zeitung“ kaj „Stuttgarter Nachrichten“) kaj la sindikata organo favore raportis kaj publikigis ankaŭ fotobildojn.



S-ano Kiefer, la organizanto de la ekspozicio en Stuttgart, donas klarigojn.

Zeitschriftenumlauf

Die bei unserer Vereinigung eingehenden Zeitschriften werden weiterhin nach ihren Herkunftsländern verteilt. Wir empfehlen unseren Mitgliedern, sich über die zahlreichen Ereignisse auf dem laufenden zu halten. Die Esperanto-Zeitschriften werden von den Esperanto-Beauftragten folgender Bezirke gesammelt und stehen auf Anforderung zur Verfügung:

Hamburg: Belgien, Dänemark, England, Niederlande

Hannover: Frankreich, Jugoslawien, restliche Länder

Nürnberg: China, Finnland, Polen

Regensburg: Schweiz, Spanien, Übersee

Saarbrücken: Italien, Schweden, Ungarn

Wuppertal: Bulgarien, Österreich, Tschechoslowakei

Anoncoj

Linz (Aŭstrio) atendas vian viziton okaze de la inaŭguro de la Esperantomonumento la 9/10an de julio 1965. Aliĝkostoj: 4.— gm (DM) pere de „PSK 138 590 Allgemeine Sparkasse Linz/D., Konto Nr. 405 086“ kun indiko „inaŭguro“. Korespondadreso: s-ro Joh. Geroldinger, Marcusgang 7, Linz/D., Aŭstrio.

Evidente reduktitaj estas la prezoj de libroj, pri kiuj eldonis liston: s-ro d-ro Siegfried Ziegler Verlag, 8031 Hechen-dorf a. Pilsensee. Petu prospekton.

Survoje al Bulgario kaj proksime al Niŝ (Jugoslavio), allogas nova montara somerumejo en la regiono Divljana — Bela Palanka — Piro. Ĝi donas okazon por banado, fiŝkaptado kaj birdĉasado. Pluajn informojn donas: Internacia Montara Esperanto Somerumejo, Bela Palanka ĉe Niŝ/Serbio, Jugoslavio.

Radio Pekino apartenas de decembro 1964 al tiuj stacioj, kiuj dissendas ĉiun vendredon kaj sabaton programon en Esperanto. Horoj: 21.00 — 21.30, ondolongoj: 30,1 m, 40,4 m, 51 m. Rimarkigoj kaj proponoj estas petataj de: Esperanto Fako, Radio Pekino, Pekino, Ĉinio.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.